

Esperanto por UN

Informilo de la oficejo de Universala Esperanto-Asocio por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 51, marto-aprilo 2021



Universala Esperanto-Asocio

La Esperanto-movado substrekas la gravecon de la gepatra lingvo

Preskaŭ ekde sia fondiĝo, Unesko emfazis la gravecon eduki infanojn per ties gepatra lingvo ĉiam kiam tio eblas – kaj per lingvo kiun ili tuj komprenas kie tio ne eblas. Sed oficialaj edukaj politikoj en multaj landoj apenaŭ priatentas tiun idealon, tiel bremsante la lernadon de siaj minoritatoj. Tio estis la esenco de la mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko okaze de la Tago de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2021.

“La celo liveri bonkvalitan edukadon al ĉiuj – la kvara el la deksep Celoj por Daŭripova Evoluigo – postulas etoson de fido kaj subteno de ĉiuj partioj: instruistoj, studentoj, politikistoj, kaj oficialaj klerigaj instancoj,” la mesaĝo klarigis. “Tia etoso siavice postulas, ke studentoj havu la plej bonajn situaciojn por lerni. Unuavice, tio signifas lernadon en lingvo kiun ili plene komprenas – nome la gepatra lingvo.”

“Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 2021 la Internacia Jaro de Paco kaj Fido,” atentigis UEA. “Bona komencopunkto de tia iniciato estus lernejoj.”

“En multaj landoj kaj cirkonstancoj infanoj ne estas instruataj en la propraj lingvoj kaj oni malmulton faras por helpi ilin transiri al la lingvo de instruado. Tio ofte malavantaĝas ilin tutvive, nuligante la pozitivan de lerneja ĉeesto, de kompetenta instruado, kaj de investo en lerneja infrastrukturo. Sen instruado de lernantoj en lingvo kiun ili komprenas, ni forĵetas monon kaj, kun ĝi, promesplenajn vivojn.” Tiel deklaris la mesaĝo.

La Asocio emfazis ankaŭ la gravecon de engaĝo de gepatroj: “En la nuna tempo, tempo de pandemio, estas aparte grave, ke la klerigo de infanoj inkluzivu ankaŭ la gepatrojn kiel partnerojn en la edukado – kaj tio en si mem eble necesigos edukadon en la gepatra lingvo, en lingvo kiun gepatroj kaj infanoj dividas inter si kiel parton de sia heredaĵo.” Edukado, precipe en frua infaneco, estu afero de familioj.

“UEA kredas je edukado por ĉiuj en lingvoj kiujn ili komprenas, je lingva justeco en ĉiuj ties aspektoj, kaj en mondo pli paca pro edukado kaj interkompreno,” la mesaĝo konkludis: “Ni alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, kaj ĉiuj kiuj kunlaboras por atingi daŭripovan mondon, ke ili plenumu Celon 4 por Daŭripova Evoluigo kaj la scion, egalecon, justecon kaj perspektivon kiun tia atingo alportus.”



Internacia **TAGO** de la **GEPATRA** **LINGVO**

21-a de februaro 2021



Per la uzo de la internacia lingvo **Esperanto** oni respektas la lingvan kaj kulturen diversecon de ĉiu homo.

Pri lingvoj: www.lingvo.info
Pri interreta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org



La Tago de la Gepatra Lingvo estis larĝe festata en la Esperanto-movado, kun specialaj afiŝoj en multaj lingvoj, kontakto kun edukministerioj, kaj forta subteno inter esperantistaj instruistoj.

“N forte favoras klopodojn meti edukadon en la manojn de tiuj kiuj plej multe zorgas pri niaj infanoj,” diris prof. Humphrey Tonkin, reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio al Unuiĝintaj Nacioj. “Ni konsideras nian kunlaboron kun Unesko kaj Unuiĝintaj Nacioj en tiu klopodo kiel gravan elementon de konstruado de pli bona kaj pli daŭripova estonta mondo.” Prof. Tonkin laŭdis Uneskon pro ties rekono, ke pere de la Internacia Lingvo ĝi povas atingi aŭskultantojn malfacile atingeblajn en pasinteco, kiel evidentas el publikigo de la Esperanto-eldono de la *Kuriero de Unesko*, kaj ankaŭ de historio de Unesko en Esperanto.

Eldoniĝis fina raporto de MondaFest’ 2020

La pandemio interrompis la 115-jaran historion de la ĉiujaraj Universalaj Kongresoj de Esperanto, sed ne la entuziasmon de la parolantoj de Esperanto. Nepovante renkontiĝi en Montreal en aŭgusto de la pasinta jaro, UEA saltis al la Reto, per trimonata Monda Festivalo de Esperanto. La Festivalo allogis spektantaron de miloj da esperantistoj el eĉ 100 landoj. Rezulte, daŭripova evoluigo, la ĉefa temo por la kongreso de 2020, ricevis eĉ pli da atento ol kutime. UEA lastatempe prezentis al Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko sian finan raporton pri la Festivalo (<http://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2021/03/MondaFest-Raporto-por-UN-Esperanto-2.pdf>). La festivalo ankaŭ estis okazo por aperigo de 100-paĝa gvidilo de la Celoj pri Daŭripova Evoluigo en Esperanto: <http://esperantoporun.org/en/publications/>

Esperanto-parolantoj trovas siajn voĉojn

Homaj Rajtoj. La pasintajn kelkajn monatojn markis blovado de agado inter esperantistoj kaj ĉe Universala Esperanto-Asocio. UEA publike elpaŝis, firme kaj urĝe, okaze de Homrajta Tago, la 10-an de decembro 2020. Notante la atingojn de UN sur la kampo de homaj rajtoj, ĝi emfazis la bezonon de novaj aliroj: “Tamen la malnovaj problemoj, kiuj plagumas la internacian komunumon jam de jaroj, daŭre hantas nin. Unu el ili estas nekapablo atingi la reciprokan interkompreniĝon bezonatan por fronti la multajn malfacilaĵojn de la mondo kaj apliki la solvojn disponigatajn al ni de sciencistoj kaj filozofoj. Dua problemo estas nia malsukceso altiri la ordinarajn homojn de la mondo en tiun mondan dialogon. Ni kredas, ke Unuiĝintaj Nacioj bezonas pli perspektivan lingvan politikon, kiu celu larĝigi kaj riĉigi mondan dialogadon kaj doni al la popoloj de la mondo la voĉojn, kiujn ili rajtas.”

Edukado. La parolantoj de Esperanto elektis la Internacian Tago de Edukado (24 januaro) kiel okazon por esprimi sin pri la komunika revolucio kaj pri la graveco alporti pli bonajn edukajn servojn al partoj de la afrika kontinento, inter ili tiuj kie Esperanto gajnas ĉiam pli multan interesiĝon: “Jam antaŭ la komunika revolucio, afrikanoj esprimis la deziron, ke aperu en la internacia lingvo Esperanto bazaj informoj pri ĉiuj fakoj, “tiel ke ni povu aliri al scioj sen uzi la koloniajn lingvojn.” Tio nun eblas per la uzo de Vikipedio, la libera enciklopedio, kiu la 15-an de januaro 2021 fariĝas 20-jara. La versio de Vikipedio en Esperanto nombras nun pli ol 290,000 artikolojn, do iom post iom konkretiĝas tiu deziro de afrikanoj. Samtempe, Esperanto-laborgrupo pri universitatoj nun esploras novajn manierojn utiligi Esperanton kiel lingvon de universitata lernado kaj instruado.” TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, kaj ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kunlaboris kun UEA en tiu komuna mesaĝo.

Holokaŭsto. Okaze de la Holokaŭsta Memortago, 27 januaro, la esperantistoj funebriis tiujn kiuj perdis siajn vivojn, precipe esperantistojn kaj internaciistojn – kaj honoris tiujn kiuj endanĝerigis siajn vivojn per ŝirmado de judaj esperantistoj: “La Esperanto-movado aparte funebras tiujn kredantojn pri internaciismo kaj internacia kompreniĝo kiuj, ĉu pro sia raso aŭ fizika stato, ĉu pro siaj politikaj aŭ sociaj konvinkoj, pereis je la manoj de la Nazioj. Inter ili estis multnombraj esperantistoj en Germanio, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj aliloke. Ili inkluzivis esperantistajn ŝtatoficistojn, instruistojn, kuracistojn, ĵurnalistojn, poetojn. Kaj inter la travivantoj estis ankaŭ esperantistaj herooj kiuj ŝirmis aliajn for de ekstermiĝo... La pola historiistino Zofia Banet-Fornalowa speciale funebris kelkajn plej bone konatajn Esperanto-parolantajn viktimojn de Hitler, kaj la germana historiisto Ulrich Lins, en sia libro *La Danĝera Lingvo*, donis al ni ĝeneralan pritakson de la vasteco de la murdoj. Multaj aliaj mortis plejparte nekonataj kaj tro facile forgesataj.”

Virinoj. “La kronviroza krizo plividebligis la neproporciajn ŝarĝojn portatajn de virinoj kaj ilian vundeblecon al diversaj formoj de diskriminado kaj perforto.” Tiel asertis deklaro publikigita de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Virina Tago, 8 marto. Samtempe, la pandemio “ankaŭ montris ilian forton kaj neanstataŭigeblan rolon en la socio. Virinoj elstaris kiel iuj el la plej ekzemplaj kaj efikaj landaj gvidantoj kontraŭ la pandemio. Lokaj virinrajtaj organizoj, virinaj grupoj kaj transnaciaj feminismaj movadoj ne haltigis sian laboron, reagis forte al la krizo, kaj eĉ atingis historiajn sukcesojn en kelkaj landoj.” La Internacia Lingvo Esperanto, aldonis la deklaro, “prezentas unikan okazon por vere tutmonda dialogo pri la vojo irenda – dialogo per unu tutmonda lingvo, kiu tuŝas ĉiujn

landojn kaj kontinentojn, kaj kiu rekte kontribuas al malferma kaj inkluziva debato engaĝanta la tuttergloban civilan socion – debato kerna al la celaro de Unuiĝintaj Nacioj.”

La Monda Organizo pri Sano proponas kurson en Esperanto

“Enkonduko pri KOVIM-19” estas la titolo de reta, memrega kurso publikigita de la Monda Organizo pri Sano. Kun helpo de la Universala Medicina Esperanto-Asocio, UMEA, asocio de pli ol cent jaroj de internacia agado, la organizo proponas Esperanto-version de la kurso:

<https://openwho.org/courses/enkonduko-al-KOVIM-19>

UNESKO-Kuriero en Esperanto: Nova numero

La januara-marta numero de *UNESKO-kuriero*, Esperanto-versio de la revuo de Unesko, proponas artikolojn pri aspektoj de la Celo por Daŭripova Evoluigo n-ro 14 – esplorado de la oceana fundo en Ĉinio, la milito kontraŭ plasto en Latinameriko, marborda erodiĝo en Ganao, kaj abundaj aliaj temoj. Eblas elŝuti ĝin ĉe: <https://idiomaesperanto.weebly.com/unesco-kuriero.html>

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.